

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de la Norvega Esperantista Ligo la 5an de junio 2008, per Skype.

(Aprobata de la estrara interkonsiliĝo la 28an de aŭgusto.)

Partoprenis:

Jardar E. Abrahamsen (en Trondheim),
Eli Fitjar (en Bergen),
Ulf Lunde (UL, en Os, sekretario),
Asbjørn Lindh (en Oslo),
Ingebjørg Rambjør (IR, en Bergen),
Arne Olav Mjøen (en Trondheim).

0. Tagordo

Aprobata kun nur eta ŝanĝo.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo

La sekretario prezentis malneton, kaj la estraro finredaktis ĝin.

2. Ekonomio

La kasisto ne ĉeestis.

3. Publikigo de donacosumoj kaj donacantoj

Okazis diskuto pri la publikigado de nomoj kaj sumoj en Norvega Esperantisto kiam NEL ricevas mondonacojn. Unu membro skribis petis de la estraro informojn pri niaj kutimoj rilate tion.

La estraro ne povas dikti, kion skribu la redaktoro de la gazeto, sed la estraro sendis (kaj ĉiam sendu) ĉiujn informojn pri donacoj al la redakcio kaj ne malpermesas publikigon, krom se la donacantoj eksplike petis anonimecon.

Ĉiuj donacantoj ricevu personan dankleteron.

4. Jarraporto/Jarkalkulo 2007

Jarraporto: La estraro estas kolektinta mankantajn informojn. Ni trairis ĉiujn restantajn punktojn, sed ankoraŭ (parte) mankas raporto de kelkaj lokaj kluboj. Ni decidis ne sendi novan admonon al la restantaj kluboj pri tio.

Jarkalkulo: Ne pretas.

5. Biblioteko en Hamar

La biblioteko de Hamar stokas ĉ 50 bretometrojn da libroj kaj ĉ 65 bretometrojn da periodaĵoj por NEL, sed ŝatus liberigi la spacon tie. Eĉ sen la duoblaĵoj, almenaŭ 20-30 bretometroj de tio konsistas el konservindaj presaĵoj.

En la kelo de Esperantonia estos loko por multaj el la presaĵoj se ni sukcesos translokigi la librojn de la malnova Eldonejo Esperanto al privataj hejmoj ktp.

UL demandas (mencianta i.a. Haldor Midthus) al la publika biblioteko de Os, ĉu ilin interesus transpreni la kolekton de libroj de Hamar, sed prefere kiel prunton, ne donacon.

6. Seminario 2008

Ni demandu al Asbjørn Lindh kaj eble Douglas Draper, ĉu ili volas prezenti iun temon, ekz-e la pac-movadon en kaj ekster la Esperanto-movado, kiel enkondukon aŭ prelegon dum seminario.

11. Eventualaĵoj

a) Kiu salutos la UK de Norvegio?

Ni delegos la taskon al Torstein Kvakland.

b) La estraro klopodos fari novan eldonkvanton de la lernolibro de Jon Rømmesmo.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2156h.

La venontan interkonsiliĝon ni planas okazigi la 28an de aŭgusto.

Raportis Ulf Lunde, sekr.